Publicação periódica - Tarifa 1531 ISSN: 0871-9241

# NiaBulteno

OUTUBRO-DEZEMBRO 1998 / OKTOBRO-DECEMBRO Numero 72

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto
Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 LISBOA ✆ +351 +(0)1 +714 13 59

"N I A B U L T E N O"

## Praviĝoj kaj malpraviĝoj de ĝia prokrastiĝo

Pasintjare, je 1997, "Nia Bulteno" aperis ĉe niaj gemembroj unikan fojon, pro motivoj tie klarigitaj. Kaj estis promesite al la paciencaj anoj de tiu-ĉi Asocio, ke tuj en Januaro de sekvonta jaro 1998 estus eldonita alia numero, tiel klopodante la deziratan revenon al la normaleco. Preskaŭ jaron poste, ankoraŭ nenio publikiĝis nek laŭŝajne publikiĝus baldaŭ. Ni opinias, ke tio ne povas plu daŭri.

Dank'al la granda kompetento kaj tiama sindediĉo de nia samideano Antono Martins, dum kelkaj jaroj "Nia Bulteno" akiris justan famon pro sia bonega grafika kaj redakta aspekto. Kaj ve, ni bone scias pri la grandaj penoj kaj persona oferado, kiujn nia Redaktoro devis elsuferi kaj transigi por pravigo de tiu famo.

La portugala esperantista movado iam trairis fazon de granda energio kaj entuziasmo, malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj de la epoko, kiam tio okazis, antaŭ la liberiga Revolucio de la 25-a de Aprilo. Ĝi estis tiam juna entuziasma movado, relative multnombra je adeptoj kaj parolantoj, sen ekzisto praktike de iu, almenaŭ en Lisbono, kaj ĉirkaŭaĵoj, ne scianta pri tio, kio estis Esperanto kaj pri ties celoj.

Malgraŭ la absoluta manko de registaraj apogoj (cetere, ankoraŭ hodiaŭ tiel estas, kvankam pro aliaj motivoj), en Lisbono ekzistis tri kulturaj esperantistaj asocioj kaj alia en Barejro. Sed meze de la jaroj 40, la tiama regis-

taro ordonis la fermigon de ĉiuj tiuj societoj, kaj malpermesis la Esperanto-instruadon.

Tamen, la tiamaj geesperantistoj ne senkuraĝiĝis antaŭ tioma frapo kaj organiziĝis je kvartalaj rondetoj, kunvenantaj ĉu hejme de iu samideano, ĉu en iu kafejo. La malnova kafejo Martinho restis en la analoj de tiu heroa epoko. Sed la konstanta polica spionado, la preskaŭ neebleco por instruado de la lingvo, kiu ĉiujn unuigis en sama idealo por paco kaj popola interkompreno, ĉio kunhelpis al neebligo de progreso de la movado inter ni. La alveno de la 25-a de Aprilo renkontis la geesperantistojn jam nuran ombron de tio, kio ili estis en antaŭaj jaroj.

Hodiaŭ, Portugala Esperanto-Asocio, unika tiufaka asocio en Portugalio, havas malpli ol 400 anojn, el kiuj duono ne parolas la lingvon aŭ nur balbute, kaj ĝenerale ili estas tre aĝaj, ne plu kapablaj doni al Esperanto la aktivecon, kiun nur juneco permesas. Kaj da junularo en niaj vicoj, nuntempe ni havas malpli ol dekon. Kaj el tiu deko, ni bedaŭrinde ne disponeblas je pli ol kvar aŭ kvin aktivantoj en nia Asocio.

Kompreneble ĉio lacigas, ĉio havas paciencolimon. Eĉ la lukto por la idealoj pli noblaj, kiaj Esperanto, kiam la homoj fine konstatas, ke la granda plimulto restas surda, fremda al la postuloj de la batalo en kiu ĝi devus partopreni. Estas malĝojige rimarki, ke eĉ en la pli simplaj taskoj, kiaj helpo al ekspedo de "Nia Bulteno", la homoj ne aperas. Kaj tiam, foje oni senkuraĝiĝas.

La nuna estraro de PEA, konstatinte la ripetfojan sinsekvan prokraston de la eldonoj de "Nia Bulteno", nemalhavebla kaj ofte unika ligilo al sia anaro, decidis restarigi la publikigadon, kvankam pli modestan, de la asocia organo. Ni ankoraŭ esperas (ja ni estas esperantoj!), ke estonte ni povos fari ĝin tian, kia ĝi estis antaŭe, kun pli bona aranĝo. Sed ja pli valoras io ol nenio!

Antaŭen por Esperanto kaj por la esperantista portugala movado!

WERTHER SACRAMENTO

---

FELIĈAN KRISTNASKON / PROSPERAN NOVAN JARON 1999

DEZIRAS AL SIA MEMBRARO

PORTUGALA ESPERANTO-ASOCIO!

# "NIA BULTEÑO"

## Razões e sem-razões do seu atraso

No ano passado, 1997, o "Nia Bulteno" apareceu aos nossos filiados uma única vez, por razões nele mesmo apontadas. E foi então prometido aos pacientes membros desta Associação que logo em Janeiro do seguinte ano de 1998 sairia outro número, assim se procurando o desejado regresso à normalidade. Um ano é passado e ainda nada se publicou nem parece vir a publicar-se para breve. Achámos que isso não pode continuar assim.

Graças à grande competência e dedicação até certa altura do nosso jovem confrade Antônio Martins, o "Nia Bulteno", durante largos anos, adquiriu justo renome pela sua excelente apresentação gráfica e redactorial. E sabemos dos grandes esforços e sacrifícios pessoais que o nosso Redactor teve que assumir e ultrapassar para que assim fosse.

O movimento esperantista português já atravessou uma fase de grande dinamismo e entusiasmo, apesar das graves dificuldades da época em que isso ocorreu, antes da Revolução do 25 de Abril. Era um movimento jovem e entusiasta, relativamente numeroso em adeptos e praticantes, não havendo praticamente ninguém, ao menos em Lisboa e arredores, que não soubesse o que era o Esperanto e quais os seus fins.

Apesar da absoluta falta de apoio oficial (aliás, ainda hoje é assim, embora por outras razões), só em Lisboa existiam três associações culturais esperantistas e outra no Barreiro. Mas em meados dos anos 40, o Governo de então mandou encerrar todas essas sociedades, proibindo o ensino do Esperanto.

Contudo, os esperantistas não cruzaram os braços ante tamanho golpe e organizaram-se em pequenas tertúlias de bairro, reunindo-se ora em casa de algum confrade, ora nalgum café.O velho café Martinho ficou nos anais desse tempo heróico. Porém a vigilância policial constante da PIDE, a quase impossibilidade de ensinar a língua que a todos unia no mesmo ideal de paz e compreensão entre os povos, tudo se conjugava contra o progresso do movimento entre nós.
A chegada do 25 de Abril encontrou os esperantistas já uma sombra do que tinham sido em anos anteriores.

E hoje, a Associação Portuguesa de Esperanto, única associação do género em Portugal, tem menos de 400 sócios, metade dos quais não falam a língua ou falam-na muito mal, e são, na generalidade, idosos, incapazes de dar ao Esperanto o dinamismo que só a juventude permite. E de juventude nas nossas fileiras, actualmente, teremos, quando muito, cerca de uma dezena. Alguns de destacado mérito. Mas dessa dezena, infelizmente, não contamos com mais que quatro ou cinco com actividade dentro da Associação.

Claro que tudo cansa, tudo tem um limite de paciência. Mesmo a luta pelos ideais mais nobres, quais os do Esperanto, quando as pessoas acabam por constatar que a grossa maioria permanece indiferente, alheia às solicitações da batalha em que devia estar empenhada. É deprimente verificar que até nas tarefas mais simples, como ajudar à expedição do "Nia Bulteno", as pessoas não aparecem. E então desanima-se.

A actual Direcção da APE, constatando os repetidos e constantes adiamentos da edição do "Nia Bulteno", indispensável e mui frequentemente único meio de ligação à sua massa associativa, resolveu, embora de maneira bem modesta, lançar mão ao reatamento da publicação do nosso órgão. Ainda esperamos que futuramente o possamos fazer como anteriormente, com melhor aspecto. Mas, mais vale algo do que nada!

Avante, pelo Esperanto e pelo movimento esperantista de Portugal!

WERTHER SACRAMENTO

---

SAMIDEANO MALSANAS

Antaŭ semajnoj, ni ricevis la malagrablan noticon, ke nia kara inĝ. Franco Simões ekmalsaniĝis. Ja malsano atingas ĉiujn. Tamen ni alkutimiĝis al la ideo, ke al nia ĉiam vigle agema samideano Simões nenio malbona povus okazi, ke malfacile ni kredis lin simpla homo kiel la ceteraj! Ni scias, ke li jam pli bone fartas, revenе al baldaŭa reaktivado. Ni do esperas, ke tre, tre baldaŭ li revenos al niaj vicoj, kie lia ĉeesto estas nepre nemalhavebla!

Rapidan resaniĝon, kara samideano Simões!

---

En Valencio, senprecedence!

## ESPERANTO ENIRAS UNIVERSITATON TRA LA GRANDA PORDO

Laŭ Augusto Casquero

En la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencio okazis, kun granda sukceso, kurso de E-o por universitatanoj. Ĝi estis la unua el la tuta Hispanio kun vera oficiala valoro.

Ĉiu partoprenintoricevis atestilon, kiu samtempe valoras du akademiajn kreditojn. En la nuna universitata sistemo en Hispanio, en ĉiu kariero ekzistas la devigaj normalaj studobjektoj. Krome, ĉiu studento dum la kariero devas nepre elekti entute 15 kreditojn inter la diversaj proponitaj. Ĉi-jare inter tiuj oni metis la kurson de E-o.

Tute neantaŭvidite, ĉar la kurso devus okazi en la Lingva Laboratorio de la Fakultato, kiu havas entute 24 sidlokojn, kvankam oni planis ke la aliĝo daŭru ĝis monato kaj duono, en nur 4 tagoj aliĝis 40 gestudentoj. Tuj oni komencis demeti la informfoliojn, pro spacomanko, por ke neniu plu aliĝu. Tamen finfine oni akceptis 60 partoprenantojn, metante aldonajn seĝojn en la klasĉambron. Sed, eĉ sen propagando, aliaj 40 interesiĝantoj petis aliĝi, kio tute ne eblis, ĉar ĉiuj pli grandaj klasĉambroj estis okupataj por tiuj datoj.

Do, por la venonta lernojaro de la universitato, ni jam havas liston de tiuj kiuj ne povis aliĝi, krom la scion ke tutcerte amaso da gestudentoj aliĝos, por kio oni pretigos pli grandan klasĉambron.

La profesoro estis Augusto Casquero, kaj agis kiel oficiala direktoro de la kurso doktorino Berta Raposo. Por la inaŭguro prelegis profesoro Antonio Alonso, eksa Prezidanto de HEF, kaj por la fermo, tute en Esperanto, prelegis la fama esperantista poeto Miguel Fernández, sub la titolo "Sur la spuroj de Federico Garcia Lorca".

Fine de la Kurso, dum la Oficiala Fermo, la Dekanino de la Fakultato, Doktorino Carmen Morenilla, disdonis la diplomojn kaj varme rekomendis daŭrigi la lernadon de E-o, laŭ ŝi "la interkomunikilo de la estonteco", kaj ankaŭ instigis la partoprenintojn doktoriĝi pri Esperanto en la

# LIBROSERVO

En la jaro 1892 (do antaŭ 106 jaroj) aperis en Portugalio la Unua Libro de Lingvo Internacia de D-ro Esperanto, en adapto al la portugala lingvo.

La adapton plenumis la portugalo Jayme Einlein Ferreira, de Lisbono, unu el la unuaj portugalaj esperantistoj.


LINGUA UNIVERSAL

„ESPERANTO"

METHODO COMPLETO

comprehendendo

DOIS VOCCABULARIOS

segundo à edição allemã do

Dr. Luiz Samenhof

traduzido e coordenado por

Jayme Heinlein Ferreira

de Lisboa

— Preço: 60 reis —

W. TÜMMEL

Officina typographica e artistica

NUREMBERGO

Tiu eldono estis presita en Nurembergo (Germanio) en la presejo W. Tümmel.

Antaŭ malmulte da tempo PEA sukcesis havigi al si fotokopion de ekzemplero ekzistanta en la Internacia Muzeo de Esperanto, en Vieno (Aŭstrio).

El tiu fotokopio la libroservo de PEA ellaboris reeldonon, por oferti al la portugala esperantistaro, kiel libro ne malhavebla en ĉies biblioteko.

Por tion plenumi, oni klopodis redoni, al nova tajpaĵo, aspekton kiel eble plej similan al la originalo konservante la tiaman portugalan ortografion kaj eĉ la erarojn, kiuj en ĝi ekzistas.

Ĝi konsistas en (nova!) libreto kun formato 14,5 x 21 cm kaj 73 paĝoj, kaj ĝia enhavo entenas la fundamentan 16-regulan gramatikon kaj du vokabulariojn E-o/portugala kaj portugala/E-o.

Do se vi estas interesata ekhavi ekzempleron de tiu unua fundamenta lernolibro en la portugala lingvo, mendu ĝin de PEA je la prezo de 300$00 plus la afranko (10%).

**A. S. Almeida**

---

Fakultato. Samtempe ŝi informis, ke laŭ la planoj de la Fakultato, la studado de E-o ne nur estos libere elektebla studobjekto, sed normala studobjekto de la kariero.

La semo tuj komencas doni frukton, ĉar jam diversaj hispanaj universitatoj petis informojn por organizi similajn kursojn.

El Valencia Luno n-ro 46
Aprilo 1998

# Ĉinaj pk-tutaĵoj kun E-surpresaĵoj

## Pekina Universitato kaj Cai Yuanpei

Por memorigi la 100-jariĝon de la Pekina Universitato kaj la 130-jariĝon de la fama ĉina edukisto kaj Esperanto-pioniro Cai Yuanpei, la Ĉina Societo Amikoj de Esperanto kaj aliaj organizoj (notitaj dorsflanke de la pk-tutaĵo en ĉinaj ideografiaĵoj) kune aperigis Esperantajn filatelaĵojn, E-an surpresaĵon sur pk-tutaĵo kaj memorkoverton la 4an de majo 1998.
La 10-fena poŝtkarto, serio 1993, ricevis surpresaĵon kun la portreto de Cai Yuanpei, ronda memoriga unuataga stampo (en verda), kaj kun la jena teksto en la ĉina kaj en Esperanto:

CELEBRE AL LA 100-A FONDIĜA DATREVENO DE LA PEKINA UNIVERSITATO KAJ LA 130-A NASKIĜA DATREVENO DE CAI YUANPEI, FAMA ĈINA DEMOKRATISMA REVOLUCIULO, EDUKISTO KAJ PIONIRO DE LA ĈINA ESPERANTO-MOVADO

Dorsflanke trovis lokon klarigoj pri la Pekina Universitato kaj Cai Yuanpei en Esperanto kaj en la ĉina. (Vidu la koncernan artikolon).

Fontoj: Informo de la Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio
Letero de Ĉin Kajĝi kaj kopioj (15.5.1998)

## Lingvisto Ni Haishu

1998.05.03. Beijing (Pekino).

Ĉina Societo "Amikoj de Esperanto" Ŝtata Komisiono, Pekina Esperanto-Asocio kaj aliaj 6 organizoj kune aperigis jenan privatan surpresaĵon sur 15-fena poŝtkarto (serio 1993) en ĉinaj ideografiaĵoj, en hanlingva fonetiko kaj en Esperanto:

MEMORE AL LA 80-A NASKIGA DATREVENO DE S-RO NI HAISHU, FAMA ĈINA LINGVISTO; KOMPILISTO-ELDONISTO KAJ EMINENTA REPREZENTANTO DE MODERNIGA AFERO DE LA ĈINA SKRIBLINGVO

Trovis lokon ankaŭ portreto pri s-ro Ni Haishu. La dorsflanke surpresita teksto estas farita (nur en la ĉina) de sinjoro Fei Jinchang (lingvisto kaj proksima amiko de samideano Ĵelezo)

S-ro Ni Haishu estis proksima amiko de samideano Ĵelezo (Ye Laishi) kaj lia kunbatalanto por la moderniga afero de la ĉina skriblingvo.

Fonto: Letero de Ĉin Kajĝi kun detalaj informoj (15.5.1998)

## Ekspozicioj

### Ekspozicio en "Memorhalo Guo Moruo" en Pekino




Sub la titolo "Granda Homo en Filatelaĵoj", memore al la 105-a naskiĝa datreveno de Guo Moruo, okazis fine de la pasinta jaro dum tri monatoj en la Memorhalo Guo Moruo en Pekino ekspozicio kun mil filatelaĵoj pri Guo Moruo (1892.11.16 - 1978.06.12). Li estis fama ĉina literaturisto kaj fervora Esperanto-subtenanto. Inter la mil diverslandaj poŝtmarkoj, unuatagaj kovertoj, memorigaj kovertoj kaj aliaj filatelaĵoj pri Guo Moruo estis aparta rubriko "Esperanta Ĝardeno" kun filatelaĵoj kaj koncernaj klarigoj

1) Laŭdaj vortoj de Guo Moruo pri la sankta ideo de D-ro Zamenhof;
2) Liaj kontribuoj al la ĉina Esperanta movado;
3) Lia amikeco kun la famaj esperantistoj Hujucz, Bakin, Ĵelezo, Verda Majo, Liu Ren kaj aliaj.

La ekspozaĵojn preparis la veterana esperantisto, nia kluba amiko, Ĉin Kajĝi. La ĉefa organizanto estis "Memorhalo Guo Moruo". Tiu eldonis por la ekspozicio specialan prospekton. En la organizado de la ekspozicio partoprenis:

1) Junulara Ligo de Akademio de Sciencoj de Ĉinio
2) Sindikato de Akademio de Sociaj Sciencoj de Ĉinio
3) La gazeto "Filatelo"
4) La Pekina Poŝtmarka Presejo
5) La Filatela Asocio
6) Esplora Asocio pri Tao Xingzhi
7) Pekina Xiqu-a Poŝtmarka Kompanio
8) Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio

Dum la malferma tago (1997.09.26) venis la Ĉina Eduka Televida Stacio por fari intervjuon kun nia Ĉin Kajĝi. Pri la ekspozicio aperis raportoj en pluraj ĉinaj ĵurnaloj: i.a. en la "Scienca-Teknika Tagĵurnalo", "Pekina Vesperĵurnalo", "Ĉina Libro-lega Ĵurnalo".

Fontoj: Informoj de la "Filatela Societo de Pekina Esperanto-Asocio". Letero de Ĉin Kajĝi (1998.05.15)

## KONFERENCO PRI ESPERANTO EN OURÉM

Sekve de invito de Escola Secundária de Ourém, okazis en ĉi tiu ŝtata lernejo, la 18-an de Novembro, grava konferenco pri Esperanto.

Prelegis d-ro João José Santos, kiu historiumis la aperon kaj evoluon de la lingvo kaj disertaciis pri ĝia funkciado kaj utileco ĉu en persona agado ĉu en internaciaj rilatoj.

La konferenco, daŭrinta 2 horojn, funkciis kiel lerneja leciono en kiu partoprenis kvar instruistoj kaj kelkdekoj da lernantoj inter la 14-a kaj 18-a jaraĝo.

Diversaj demandoj de la ĉeestantoj multe kontribuis por la vigleco kaj efikeco de la sesio.

La estraro de PEA estis reprezentata de sia sekretario Alcino Alves, kiu kunportis disvastigan materialon pri Esperanto kaj respondis al diversaj demandoj pri la funkciado de la Asocio.

Oni devas substreki la tujan pretecon de d-ro João Santos por prelegi kaj la rimarkindan atenton kiun li sukcesis veki ĉe la ĉeestantaro.

ALCINO ALVES

---

## CURSO ELEMENTAR DE ESPERANTO

Em meados de Janeiro de 1999 terá início um novo curso elementar de esperanto, na sede da nossa associação.

O curso, dirigido pelo dr. João José Santos, será constituido por uma série de 20 lições, cada uma das quais terá a duração de cerca de hora e meia. Funcionará aos sábados de tarde na sede da Associação Portuguesa de Esperanto e estará sujeito a um regulamento elaborado pelo respectivo Departamento de Ensino. Admite-se que, após a 1.ª série de 20 lições, possam ocorrer mais 2 séries, tendo em vista o aperfeiçoamento da língua.

O preço do curso foi fixado com base no valor de 5000 escudos por cada 20 horas.

Os interessados deverão contactar a Associação através de carta ou pelo telefone 714 1359, aos sábados de tarde.

## TIEL MI EKLERNIS ESPERANTON

El "Norvega Esperantisto" (Apr. 1998)

EN MIA TAGLIBRO mi unuafoje menciis Esperanton en mardo la 18a de novembro 1986. En la gimnazio tiun tagon ni havis provon pri geografio. En la paŭzo antaŭ la provo mi skribis multajn helpvortojn sur la tabulon, sed mi skribis ilin inverse, kaj metis la titolon «Esperanto». La grandega tabula fuŝilo ne estis malkovrata, sed laŭ mia taglibro mi mem ne bezonis ĝin.

Duonan jaron poste la anglalingva periodaĵo Time aperigis artikolon pri la centjariĝa lingvo Esperanto. La artikolo estis presita en du kolonoj, maldekstre en la angla, kaj dekstre en la jubilea lingvo mem. Mi ja antaŭe aŭdis pri Esperanto. Mia avino, kiu mortis du monatojn antaŭe, ofte menciis, ke ĉiuj devus lerni Esperanton en la lernejo, kaj ĝi laŭdire estas facila lingvo. Nu, fakte ŝi iom konfuziĝis pri Esperanto kaj Ido, sed tion mi povas pardoni.

Mi legis la artikolon en lundo la 27a de julio 1987. Mi unue legis la anglan version. Poste mi trovis kompreneblajn vortojn en la Esperanta teksto, kaj mi rapide analizis, ke -n devas esti akuzativo, -j devas esti pluralo, ktp. Mi decidis lerni la lingvon.

La postan tagon mi kapablis skribi en mia taglibro: «Mi ne parolas esperanton, sed mi esperas!» Krom la minusklo en «esperanto» tio estis bona lingvaĵo. Mi jam estis provinta telefoni al NEL, sed respondis nur la aŭtomata respondilo. Sed mi ne senkuraĝiĝis. Kontraŭe, mi skribis, denove en Esperanto: «Mi lernos esperanton.» En la ĵaŭdo mi denove telefonis al NEL, kaj verŝajne mi parolis kun Douglas Draper aŭ Carl Støp-Bowitz, kiu konfirmis ke –n jes estas akuzativo kaj –j estas pluralo. Tagojn poste mi ricevis pli da informo en la poŝto.

Mi ricevis la kurson *Jen nia mondo* la 25an de novembro. Tiun vesperon mi tute ne faris miajn hejmtaskojn. Kaj tiel mi eklernis Esperanton.

Jardar Eggesbø Abrahamsen

ĈU ALIAJ niaj membroj volas simile rakonti kiel vi konatiĝis kun Esperanto? – Red.

## CIRKULANTA BIBLIOTEKO

Ni volas memorigi al niaj membroj, ke en la kursosalono de nia sidejo staras kvar grandaj ŝrankoj kun miloj da Esperantlingvaj libroj. Unu el tiuj ŝrankoj enhavas la Cirkulantan Bibliotekon, alirebla de ĉiuj kunasocianoj senpage. Vi nur bezonas veni, elekti, legi hejme kaj redoni!

EXPOLINGUA PORTUGALIO

9-a PORTUGALA SALONO PRI LINGVOJ KAJ KULTUROJ

22-a kaj 24-a oktobro 1998

Akceptinte la ĝentilan inviton de la Estraro de Expolingua Portugalio, ni partoprenis pluan fojon tiun-ĉi interesan famiĝintan iniciaton, okazinta en Forumo Telekom-Lisbono, en kvartalo Picoas, inter la 22-a kaj 24-a de oktobro Ni instaliĝis en budo 112.

Transportado de la ekspoziciota materialo, Esperantlingvaj libroj, revuoj kaj propagandaj faldfolioj, estis tre faciligita de nia kara samideano Francisco Melo, kiu sin disponigis kune kun sia aŭtomobilo por tiu tasko, kion ni tre dankas.

Akceptado de la multenombraj vizitantoj estis garantiata fare de la samideanoj Alcino Alves, responsa reprezentanto de nia Asocio, la nelacigebla inĝ. Franco Simões, la ĝentila Georgina Pereira, José Luís Mendes, Werther Sacramento, kaj kolonelo Gonçalves Pires, al kiuj Portugala Esperanto-Asocio dankas pro la efikeco montrita.

Kiel ni jam diris, la alfluo de vizitantoj estis granda, do ni esperas, ke kelkaj el ili plenumos sian promeson viziti nian sidejon kaj ellerni Esperanton, tiel enirante nian movadon.

Ĝi fakte estis pozitiva organizaĵo kaj tial ni tre dankas al organizantoj de Expolingua, ke ili ne forgesis nin!

---

L A F E R I E J O

SALUTON - Kultura Kooperativo de Geamikoj de Esperanto kaj Naturo, estas malfermita al la geesperantistoj de ĉiuj landoj.

La prezo estas simbola. Mendoj al

Maria Salete Santos
Rua do Miradouro, 12
2735 Agualva/Cacém
Portugalio

EXPOLINGUA PORTUGAL

## 9.º SALÃO PORTUGUÊS DE LÍNGUAS E CULTURAS

22 a 24 de Outubro de 1998

Acedendo ao amável convite dirigido à nossa Associação pela Direcção da Expolingua Portugal, participámos mais uma vez nesta interessante e prestigiada iniciativa, que se realizou no Forum Telecom-Lisboa, nas Picoas, entre 22 e 24 de Outubro, tendo-nos sido cedido o Stand 112.

O transporte do material a expor, livros e revistas em Esperanto e folhetos de propaganda, foi grandemente facilitado pelo nosso caro samideano Francisco Melo, que se prontificou com o seu carro para essa tarefa e a quem muito agradecemos.

O atendimento dos numerosos visitantes foi garantido pelos samideanos Alcino Alves, que foi o responsável pela entidade, o infatigável eng.º Franco Simões, a gentil Georgina Pereira, o José Luís Mendes, Werther Sacramento e o coronel Gonçalves Pires, a quem a Associação Portuguesa de Esperanto agradece pela eficiência demonstrada.

Como já dissemos, a afluência de visitantes foi grande, ficando-nos a esperança de que alguns cumpram a promessa de nos visitar na sede e aprender o Esperanto, integrando-se no nosso movimento.

Foi de facto uma jornada positiva e por tal muito agradecemos à organização da Expolingua o ter-se lembrado de nós!

Preço: 100$00 Trimestral

**Directora:** Olga ALMEIDA

**Propriedade de Associação Portuguesa de Esperanto**
Pessoa Colectiva nº 501 547 312

**Redacção, Administração, Composição e Impressão:**
Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 LISBOA

Registo nº 110 966 — Depósito legal nº 21 871/88